

---

# ESPERO KATOLIKA

*monata revuo fondita en 1903*

JARKOLEKTO 68 n. 622

---

n.ro 12

Decembro 1971

## KRISTANASKO-VESPERO

En urbo trankviliĝas  
la bruo de l'homa laboro  
kaj ĉiuj nun hejmen rapidas,  
fantomaj en neĝa dekoru.

Vespere la infanoj  
atendas la patran revenon;  
kaj baldaŭ l'abio brilanta  
anoncos la ravan festenon.

Ekstere sonoriloj  
invitas kristanojn al paco.  
Malfermu nun koron al ĉiuj:  
por homoj plej urĝa donaco.

Denove regos amo  
en mondo sen ia espero:  
ĉar nur Di-infano kapablas  
havigi feliĉon al tero.

*E. Paesmans (Belgujo)*



## KRISTANASKO-PENSERO

Al kristnaskaj sonoriloj,  
al kristarbo-lumobriloj  
taŭgas ne militludiloj.

Ĉar en tiu mondmalhelo  
bril' de l' Betlehema stelo  
vokas nin al paca celo.

Sekvu Lian pacproklamon,  
praktikante Lian amon,  
malhelpante mondan dramon!

*Walter Mudrak, Vieno, Aŭstrujo.*

## KARAJ LEGANTOJ!

Fine aperis la lasta kajero de ĉi  
tiu jarkolekto.

Por gajni tempon kaj ankaŭ pro  
la malbonata financa situacio ĉi  
tiu numero estas dumonata. Al  
ili, kiuj plendas, ĉar la kajeroj ĝis  
nun aperis tro malfrue, ni diras:  
bonvolu esti komprenemaj. La  
ŝanĝoj en nia Asocio, la longa tem-  
po, kiun postulas la presado kaj la  
korekto de preseraroj, ankaŭ pro  
tio ke la presistoj ne estas espe-  
rantistoj; la malgranda nombro  
de la membroj, kiuj sendas mate-  
rialon por nia revuo; la peza la-  
boro por gajni la membrojn forla-  
sintajn IKUE'n kaj aliaj faktoroj  
estis la kaŭzoj de la malfrua ape-  
rigo de EK.

Sed ni klopodos, ke venontjare  
la revuo alvenu ĝustatempe kaj  
estu pli bela. Ni dankas ĉiujn, kiuj  
kunlaboris.


Mi ripetas la vortojn de nia prezi-  
danto: « Oni povos reflorigi la tu-  
tan Asocion, se ĉiuj alportos sian  
malavaran kontribuon...

La unua fonto de niaj financoj  
estos la ordinaraj pagantaj mem-  
broj.... » Do bonvolu sendi tuj al  
viaj reprezentantoj la jarkotizon.  
Ni invitas tutkore ĉiujn elirintojn  
reveni al IKUE por fortigi nian  
movadon. La unuiĝo faras la for-  
ton.

Ni esperas, ke la materialo (arti-  
koloj, raportoj, fotoj, proponoj  
ktp.) kreskos pli kaj pli.

Kun tiu espero mi bondeziras be-  
natan kaj feliĉan Kristnaskon al  
Vi kaj al viaj karaj familioj.

*La redaktoro.*



## Tre karaj geamikoj,

la Dia Infano alportu al vi ĉion, kion vi deziras: la pacon, la ĝojon, vigan agadon pro lia Regno, ekumenajn fruktojn. La novan jaron ankaŭ mi bondeziras al vi ĉiuj, plena je la dia beno.

Por nia IKUE mi preĝas Dion, por ke li faru ĝin ĉiam pli taŭga ilo por la disvastigo de la interkompreno kaj de la amo inter la kristanoj.

Mi deziras al mi, fine vidi vin ĉiujn dum la venonta jaro, se estos eble, dum nia kongreso.

La Prezidanto  
D. Ferdinando Longoni

---

---

*El la bulteno « Leviĝanta Suno » organo de la japana filio de IKUE*

## PENSOJ JE KRISTNASKA FESTO

Sebastian Knorr, S. J.

La vera senco de la Kristnaska festo ne estas en nia donacado, aŭ ricevado de donacoj fare de homoj. Ĝi estas pli profunda, en tio ke Dio donacas al ni. La plej granda donaco, kiun Dio faris al ni, estas la gracoplena alveno de Kristo, nia Dio kaj Savanto, kiu venis al ni per sia naskiĝo en Betlehemo. Ĉi tiu donaco de Dio al ni kaj nia donaciteco fare de Li estas la plej profunda kialo, pro kiu la homoj — kvazaŭ imitante Dion — penas je la Kristnaska festo, mem esti donacantoj.

La unua senco de Kristnaska festo estas rememoro pri la gracoplena naskiĝo de Kristo en la kaverno de Betlehemo. Ni memoras kaj meditas pri la tempo, loko de la naskiĝo, la infaneton en la manĝujo, kaj Lian malriĉecon, humilecon, Lian amindumecon kaj malgrandecon kaj senfortecon. Ni rigardas la personojn ĉe la manĝujo: la plej beatan Virgulinon en ŝia patrina ĝojo kaj devocio, la sanktan Jozefon, la anĝelojn kaj la paŝtistojn, kaj lernas ĉi tie kiajn sentojn ni mem devas havi.

Ni primeditas la misteron de savo, kiu okazis: la alveno de la senfina, sankta Dio sur ĉi tiu fina, nesankta mondo. Li venas en la formo de

homo, kiel malgranda infano, kiel filo de Maria, kiel nia frato. Mirinda unuiĝo fariĝis inter Dio kaj homo. Dio fariĝis homo, por ke ni homoj unuiĝu kun Dio. Kristo venas en la mallumon, kiu kuŝas sur la homoj kaj la mondo, por ke blinduloj fariĝu vidantaj, lamuloj iru, lepruloj puriĝu, surduloj aŭdu. Li venas por vekti spirite mortintojn kaj anonci la feliĉigan sciigon al la malriĉaj. Li venas kiel nia frato kaj modelo, kiel nia amiko kaj perfektiganto. Li venas en la sankta sakramento de la Eŭkaristio por ĉeesti ĉiam en niaj animoj kaj inter la homoj.


La sentoj de la Jesu-infano estas nemezurebla amo al Dio kaj al la homoj kaj preteco oferi sin por ili. La sentoj de malriĉeco, humileco, obeemo, servado kaj mildeco, ĉiuj sentoj de la ok beatecpromesoj vivas en Li.

Pro la alveno de la Diinfano ni admiras la saĝecon kaj ĉiopovon, la amon kaj malaltiĝon de Dio. Pro la Jesu-infano ni spertas la rivelon de la bonkorecaj kaj kompatemaj savo-volo kaj savo-farado de Dio, kiuj daŭras ĉiujn tagojn ĝis la fino de la mondo. En Maria brilas ŝia kredo kaj pureco kaj humileco kaj Di-amo kaj obeemo, kiu estas preta fari ĉiujn oferojn. Tiu, kiu alproksimiĝas al la Patrino per ĉi tiuj ŝiaj sentoj, ne forestos de ŝia Dia filo. Kiam la lumo de Kristo brilas en ni, la kredo ne mortos en Kristano, nek la humaneco en la homo. La kredema meditado de kristnaska okazaĵo malfermas niajn korojn al tio ke Kristo venas al niaj animoj. Tio ja estas la plej profunda senco de la Kristnaska festo por ni: la nova naskiĝo de Kristo en ni.

Kiam ni faras la memoron pri la naskiĝo de Kristo en Betlehemo per kredema kaj pia devocio, la Sinjoro venas al ni. Verdire Kristo ne venas al ni per videbla homa formo, sed li venas al ni per sia nevidebla Dieco, por loĝi en ni kiel li tiam loĝis en la kaverno de Betlehemo. Li venas al ni kiel nia Savanto kaj Elaĉetanto kaj alportanto de la savo. Li venas en amindumeco kaj bonfaremo kaj humileco kiel tiam, kaj Lia koro estas plena de kompatemo kaj mildeco. Li venas kun siaj donoj: intima amikeco, spirita unuiĝo, intima interrilato kun Dio Patro, kaj Sankta Spirito. Li venas al ni diversmaniere: per la anoncado de la vorto de Dio fare de la Eklezio li frapas al nia koro. Per la kredema meditado pri la Kristnaska mistero ni tuŝas Jesuon kaj nia animo malfermiĝas kaj pretiĝas por Lia graco alveno. Kiam ni konscie akceptas Lin en la sankta komunio, Li venas persone kiel tiam, la Jesu-infano, en nian animon. La mezuro de la veno de Kristo estas pli granda je Kristnaska Festo ol alitempe, ĉar la tuta eklezio anoncas la alvenon de Kristo kaj kredeme adoras Lin. La Sinjoro volas enverŝi Sian fluon de Lia vivo al ĉiuj soifantaj animoj pli abunde ol alitempe.

La Sinjoro venas. Ni akceptu Lin ĉe ni, ĉar al tiuj, kiuj akceptas Lin, Li donas la rajton fariĝi filoj de Dio.

# NOVA JARO, NOVA VESTO



Certe vi jam komprenis, kion signifas tiu malgranda bildo.

Ĝi estas la kovrilo de nia revuo por la venonta jaro.

Esperanto, fakte, estas tre taŭga ilo, eĉ ŝlosilo, de tutmonda interkompreno, precipe por nia katolika ideo.

Unuflanke la ŝlosilo aspektas kutima formo de seruro, aliflanke tiu formo estas farita de literoj E.K. Rapide bv. aboni, se ĝis nun ankoraŭ vi ne faris, ĉar estas domaĝe perdi iun kajeron de la tuta jarkolekto.

---

---

## EKUMENAJ INFORMOJ.

### Rilatoj inter Vatikano kaj Ruslando.

Nur kvar jarojn post la « oktobra revolucio » okazis la unua renkontiĝo inter soveta aŭtoritatulo kaj reprezentantoj de la Sankta Seĝo.

Tiu estis la unua paŝeto de malfacila dialogo.

Dum multaj jaroj ne okazis rilatoj. La aferoj ŝanĝis dum la pontifikeco de Johano XXIII: oktobre 1962, sekve de vojaĝo de mons-ro Villebrandt, la patriarkujo de Moskvo sendis, kun granda surprizo de ĉiuj, du « observantojn » al la Ekumena Koncilo: oni pensis, ke tio ne okazis sen la konsento de la ŝtataj aŭtoritatuloj.

La 7-an de marto 1963 alia surprizo: la Papo akceptis la bofilon de Krušov, Agiubej, kun lia edzino; en tiu atmosfero okazis la liberigo de mons-ro Slipyj kaj de mons-ro Beran. Junie de tiu jaro la moskva patriarkujo estis reprezentita oficiale ĉe la funebro de Papo Johano XXIII kaj ĉe la krono de Paŭlo VI.

Oktobre 1965 la Papo renkontis ĉe la UNO la eksteran ministron Gromiko'n. La saman ministron li renkontis en la jaroj 1966, 1970. La lasta renkontiĝo estas lasta gesto de dialogo komencita antaŭ 50 jaroj. En 1970 okazis ankaŭ la vojaĝo de la vatikana delegito mons-ro Casaroli en Ruslandon. Tiam oni povis por la unua fojo paroli pri la situacio de la katolika Eklezio en Ruslando. Antaŭe de soveta flanko oni ne akceptis paroladon pri religiaj problemoj. La rezulto ne estas granda, tamen ne mankas bona progreso kaj la daŭro de dialogo.

La soveta preso taksas pozitive la vojaĝojn de Paŭlo VI. La sendia rusa revuo « Scienco kaj religio » dediĉas longan artikolon al la politiko de Paŭlo VI. Laŭ la revuo Paŭlo VI estas porpaca pilgrimanto tra la mondo, liaj vojaĝoj, paroladoj, mesaĝoj estas kontribuo ne malgranda al paco kaj al la justeco en la mondo.

## Nekatolika patriarko vizitas la Papon.

La vizito de Patriarko Mar Ignatius Jakob III al la Papo estas nova paŝo en la rilatoj inter la Eklezio katolika kaj la Eklezio sira-ortodoksa.

La Papo kaj la Patriarko renkontiĝis fine de oktobro en la malnova sinoda salono, kie ĉeestis multaj sinodaj patroj. Paŭlo VI kaj Jakob III dankis Dion, kiu donis al ili tiun historian eblecon preĝi kune, interŝanĝi frate vidpunktojn koncerne la necesojn kaj la problemojn de la Eklezio de Dio kaj atesti sian komunan deziron, ke ĉiuj kristanoj intensigu sian servon al la mondo humile kaj sindone. La Papo kaj la Patriarko agnoskis kun ĝojo la profundan unuecon ekzistantan inter la du eklezioj: multaj faktoroj atestas la agadon de la Sankta Spirito, nevideblan sed tre efikan.

---

---

## BIBLIO KAJ MODERNAJ LINGVOJ

Dio alparolis la homojn uzante homajn lingvojn. La dia parolo « homiĝis » por esti al homoj komprenebla, en la limoj laŭ kiuj Dio povas esti komprenata. Fakte la inspiritaj libroj estis verkitaj en la hebrea kaj greka lingvoj, apartenintaj al certaj popoloj en certaj historiaj epokoj. La « kompara » studado de samepokaj literaturaj eksterbibliaj verkoj montras, ke la bibliaj verkintoj ĉerpis multe el la kulturoj ilin ĉirkaŭantaj.

Tamen malgraŭ tiaj parcnecoj la bibliaj tekstoj havas tute originalajn karakterizojn.

La malnova Testamento uzas tute konkretan lingvostilon.

Dio estas prezentata pere de imagoj. Li kreas kaj vokas, minacas kaj punas, terurigas pekulojn pere de sia « kolera rigardo », restarigas pentintojn pere de sia dekstra mano.

Tia lingvomaniero estas komprenebla ĉu por primitivaj, ĉu por altkulturaj popoloj. Ni ne forgesu la ĝeneralan lingvistikan leĝon, laŭ kiu abstrakta lingvaĵo ĉiam devenas de konkreta lingvomaniero. Fakte la Malnova Testamento, malgraŭ sia konkreteco, prezentas tute esceptan, altan ideon de Dio kaj de liaj elpaŝoj en la homan historion, elpaŝoj kiuj « kreis » tute esceptan popolon, portontan la dian mesaĝon al la aliaj gentoj.

La Nova Testamento estis verkata en la greka, kaj do en lingvo, kiu havis vastan kaj altkvalitan literaturon. Tamen la N. T. estas profunde malsama ol la ĝis-tiama greka literaturo. Kaŭzo de tio estas ne nur la fakto, ke ĝiaj aŭtoroj estas hebrea, kiu taksis la Novan Testamenton kiel daŭron kaj plenumon de la Malnova, sed ankaŭ la fakto, ke ili uzis ne la kulturan lingvon, sed popolan esprimmanieron... Tio ne estas hazardo, sed dependas de tio, ke la evangelia mesaĝo ne adresiĝas al la mondaj altranguloj, sed precipe al la « malgranduloj ». « Mi ne predikis per persvadaj argumentoj de homa saĝeco » (1 Kor. 2, 4). « Judoj serĉadas miraklojn kaj la Grekoj saĝecon, sed ni predikas Kriston krucumitan... » (1 Kor. 1, 22-23). « Mi laŭdas vin, Patro, Sinjoro de la ĉielo kaj de la tero, ĉar vi kaŝis tion al saĝuloj kaj inteligentuloj kaj malkoŝis al infanoj » (Mt. 11, 25).

Ni tuŝas ĉi tie esencan trajton de la evangelio: malgraŭ eksteraj similecoj kun parencaj literaturoj, ĝi modifis la tiaman lingvon por adapti ĝin al la originaleco de sia enhavo: ankaŭ sur la lingvan kaj literaturan kampon ĝi etendis sian senarmilan, sed profundan revolucion, mi dirus en dialektikaj rilatoj kun la tiama civilizo.

Tiel, kontraŭ la tiama aristokrateca

literaturo, ekstaris nova, popola esprimmaniero, kaj surbaze de la evangeliaj tekstoj naskiĝis la « kristana literaturo ».

La apartigo inter kristana kaj pagana literaturo ne dependas de tio, ke la unua havas baptitajn kaj la dua ne-baptitajn aŭtorojn, sed de tio, ke ili estas profunde malsamaj. La kristanoj krejs novan stilon, samkiel ili krejs novan valorskalon kaj vivmanieron, ĉar kristanismo estas fermento, nevidebla ja, sed ŝanĝanta la tutan amason. Kompreneble tio ne okazis sen malfacilaĵoj kaj polemikoj. Sankta Aŭgusteno, tre klera profesoro, kiam — antaŭ sia konvertiĝo — provis kontakti kun la Sankta Skribo, ekhavis la impreson tre malagrablan: « Gi ŝajnis al mi malinda esti komparata kun la majestoplena cicerona stilo » (Konf. 3, 5). Nur poste, legante ĝin pli humile, troviĝis tie la lumon kaj la veran saĝecon, kiun li longtempe senefike estis serĉinta aliloke. Li fariĝis unu el la plej gravaj Patroj de la Eklezio.

Verdire la « ekleziaj » lingvoj, latina, greka, slava estis uzataj ne nur en la liturgio kaj la religiaj libroj, sed estis dum jarcentoj la precipaj eŭropaj kulturlingvoj. Ili, pli ol la klasikaj, transdonis siajn karakterizojn al la modernaj lingvoj.

Mi ne troigas deklaran, ke la novgreka kaj la novlatinaj, ekz. hispana, franca, itala lingvoj, formi-

ĝis sub decida influo de la biblia kaj pli ĝenerale de la kristana lingvostilo. Ankaŭ la aliaj okcidentaj lingvoj portas en si nefoviŝeblan biblian stampon. Ni memoru, ke la biblia traduko en la gotan, fare de episkopo Vulfilo, formas la unuan gravan literaturan tekston de la germana lingvogrupo, al kiu apartenas ekz. la germana, la angla kaj la sveda.

Same oni devas diri pri la unuaj slavaj literaturaĵoj: ili konsistas el la biblia traduko fare de la misiistoj de la Slavoj », Cirilo kaj Metodo. Ili estis devigataj krei ne nur la alfabeton, sed ankaŭ la literaturan lingvostilon, adaptante la ĝis tiam parolatajn dialektojn al la postuloj de la biblia teksto. La slava eklezia lingvo tre kontribuis por konservi la kulturan unuiĝon inter la slavaj popoloj kaj formi naciajn lingvojn, ekz. la rusan, bulgaran kaj ĉeĥan.

Eble mi tro substrekis la similecon ekzistantan inter la biblia kaj la modernaj okcidentaj lingvoj. Estus erare forgesi, ke nia moderna mondo estas malproksima de la biblia pensomaniero. Mi lasas al aliaj la taskon, eksplicite kiel oni povas transdoni la evangelian mesaĝon pere de moderna, nebiblia dirmaniero. Miaflanke mi intencis nur montri, ke biblia mesaĝo havas ankaŭ nun privilegiitan efikon.

**B. Cadei (instruisto en la porpastro Seminario de Bergamo - Italujo).**

---

---

## ANONCETO

S-ro Paesmans (Antwerpen-Belgujo) komunikas, ke lia poŝtkonto estas 4145.89 kaj la abonkotizo por 1972 estos 160 BF.

Se aliaj landaj reprezentantoj komunikos la valoron de la abonkotizo por EK, ni publikigos ĝin en nia revuo.



## EL LA LANDAJ ASOCIOJ

---

En la Numero 54 de « Katolika Esperantisto » de la katolika esperantista hispana asocio (somero 1971) aperis raporto pri la XXXI hispana kongreso de Esperanto kaj juĝo pri Espero Katolika.

Ni alĉerpas iujn frazojn:

### XXXI Hispana Kongreso de Esperanto

« En Alicante laŭ la antaŭvidita programo okazis kun granda sukceso la XXXI Hispana Kongreso de Esperanto de la 19-a ĝis la 24-a dt julio. La vetero kvankam varma estis sufiĉe tolerebla. Granda amaso da kongresanoj ĝuis la diversajn erojn de la programo. Oni devas reliefigi la solenan Meson en la Katedralo, antaŭ kies pordo gejunuloj disdonis foliojn kun la esperantaj respondoj por la Meso.

Bonega junular-horo kantis diversajn salmojn. D-ro de la Puente legis la epistolon kaj respondan salmon. Pastro Claramunt, kiu celebris la Meson, predikis ankaŭ belegan sermonon. Poste okazis la solena malfermo...

Profitante la okazon de la hispana Kongreso de Esperanto, katolikaj esperantistoj kunvenis en salono de la Kongresejo.

La prezidanto de K.E.H.A. plendis pri la malfacilaĵoj suferitaj en la redaktado de KATOLIKA ESPERANTISTO pro manko de helpantoj.

Multfoje oni promesis al li helpon en la redaktado de la revuo, sed pro diversaj kialoj la promesoj ne efektiviĝis. Nur unu-du helpas. Li invitis ĉiujn, kiuj povas fari tion, verki artikoletojn por la revuo. Se oni povus starigi redaktoran grupeton, sufiĉus al ĉiu redaktoro verki nur unu artikoleton po jare. S-ro Canet en la nomo de la Alikanta grupo promesis ilian helpon. Poste oni parolis pri Espero Katolika kaj la nova estraro de IKUE. Estas ĝojiga por ĉiuj la korekto de la devojiĝo de tiu revuo.

D-ro la Puente instigis al ĉiuj apogi la novan estraron de IKUE, revenante al la vicoj de la Asocio, kaj varbante novajn membrojn ».

### Espero Katolika

Pri nia revuo la hispana gazeto diras: « Finfine alvenis al ni Espero Katolika, la revuo de IKUE. Ni devas gratuli pro tio la estraron de IKUE kaj precipe la tri respondeculojn (P. Longoni, P. Flammer, S-ro Scherer), ĉar ĝis nun ankoraŭ vakas la redaktora posteno.

La formato kaj eksteraĵo estas agrabla kaj belaspekta, presita en bonega papero, kaj la diverseco de literformoj estas tre alloga. Sed precipe frapas nian atenton la riĉa, varia kaj kontentiga enhavo. Ni opinias, ke la revuo marŝas sur la rekta vojo kaj ni esperas ke ĉiuj apogos ĝin forgesante pasintajn faktojn, en frata kaj ama konkordo. Ne nur devas reveni al la vicoj de IKUE ĉiuj, kiuj forlasis ĝin pro la konataj kialoj, sed ĉiuj katolikaj esperantistoj ĝis nun izolitaj. La unuiĝo faras la forton, kaj la celo de ĉiuj katolikaj esperantistoj estas konstrui potencan kaj gravan Asocion ĉu nacian, ĉu internacian ».

**F. P. S.**



## RAPORTOJ EL AŬSTRUJO

---

Alvenis raportoj pri la agado de katolikaj aŭstriaĵoj esperantistoj dum la jaroj 1970-71. Ni gratulas ilin pri ilia fervora agado kaj belaj sukcesoj. Kiam okazis la Universala Kongreso en Wien, la katolikaj samideanoj multe kontribuis al la belega sukceso de la Kongreso, kies aranĝo estis laŭdita de multaj eksterlandaj gazetoj.

AKLE (Aŭstria katolika ligo esperantista) estas aŭstria branĉo de IKUE; ĝia honora prezidanto estas la ĉefepiskopo de Salzburg D-ro Ed. Machener. Nia fervora kaj senlaca samideano W. Mudrak estas ĝia afergvidanto-sekretario. Liglandaj sekretarioj: D-ro Perko (Graz), S-ro Dürschmid (Klagenfurt), D-ro Halbedl (Knittenfeld). La katolikaj gesanoj en la linglandoj, inter ili la pastroj, estas en kontakto kun AKLE per la internacia organo de IKUE « Espero Katolika » resp. per la AKLE-rubriko en AERevuo.

AKLE-grupo Francisko Mestan en Wien regule kunvenas ĉiam la 2-an kaj 4-an mardon de la monato en Wien. Okazas perfektigo en la lingva scio, komuna tradukado de konsiderindaj tekstoj, prelegoj kaj pritraktoj de papaj enciklikoj en Esp., precipe la porpacaj, libera konversacio, raportoj, komuna kantado ktp.

Gazetara servo: rubriko en AERevuo, kunlaboro en EK kaj aliaj katolikaj E-gazetoj, aperigo de traktaĵoj kaj raportoj pri Esperanto en lokaj gazetoj ĝenerale, precipe en katolikaj revuoj, ekz. « Die Furche », « Die Mutter », « Wiener Kirchenzeitung » ktp.

Radio-servo: verkado resp. disponigo de koncernaj aktualaj informoj, resp. tekstoj pri kulturaj resp. kulturreligiaj. Kunlaboro en « Pax Christi », la oficiala katolika pacmovado. Ĉe intern. PAX-CHRISTI-kongreso en nov. 1970 en Londono partoprenis s-ano Mudrak

kiel oficiala delegito de IKUE kaj « Ude Friedensgemeinschaft ».

IKUE-agado: en la dua komuna IKUE-KELI-kongreso, organizita lastmomente, improvize, sed bonsukcese de nia s-ano Dürschmid kaj s-ano Schmid, en Klagenfurt, oni decidis skriban voĉdon por elekti novan IKUE-estraron. Al la komisiita balotkomitato apartenis niaj s-anoj Dürschmid kaj Casar, Klagenfurt, kaj Galbusera, Italujo: ili efektivigis la voĉdonon modele; rezulto: Prezidanto pastro Ferdinando Longoni, Limbiate (Milano-Italujo) kun 92 voĉoj el 150; al la internacia estraro por Aŭstrio estis elektita s-ano Mudrak. Estis eble, doni konsilojn kaj gvidan kaj loĝikan helpon al vojaĝantoj alilandaj, i. a. al IKUE-prezidanto pastro Longoni, okaze de tie travojaĝo en Vieno revene de partopreno ĉe E-kunveno en Praha.

Al la 56-a UK en Londono resp. al la 3-a interreligia kunveno esperantista (IRKE) sam. Josef Eder kontribuis per sia referaĵo pri la komuna temo « Religio kaj scienco ». Dum 50 jaroj sam. Eder kolektis tiom da materialo, ke ĝi jam formas malgrandan muzeon de esperantaĵoj, kiuj kapablas demonstri la valoron de la internacia lingvo Esperanto.

En la universitato de Graz okazos baldaŭ kursoj de Esperanto:

D-ro Perko instruos kiel lektoro.

Depost aŭtuno 1971 esperanto estas instruata en 5 ĉeflernejoj de Vieno, kiel libervola fako. La E-instruado de d-ro Grimme en la pedagogia instituto en Vieno por instruistoj sukcesis.

Samideaninoj M. Loibel kaj Inge Kurz modele kaj ofere gvidas la E-centron de Vieno.

Salzburg: adventa agado.

La katolika junularo de Salzburgo en advento de pasinta jaro per manĝo-

striko en malgranda rondo publike protestis kontraŭ la profanigo kaj materialista aranĝado de Kristnasko. En la nunjara advento denove kelkaj agadoj estas intencitaj: vizito al eksterlandanoj, kontaktado kun solecaj homoj, por ŝiri ilin el ilia soleco kaj izoleco, aldone ankaŭ laŭebla transono de donaco.

Dum la kristnaska foiro sur Mirabell-Platz infanoj hontigos la uzadon de militludiloj kaj atentigos la plenkreskulojn pri normala infan-ludilaro. Ne kap-jesi, sed fari ion: jen la esenca devizo de la katolika junularo de Salzburg okaze de advento 1971.

W. Mudrak

---

---

## LA LEGANTOJ SKRIBAS

Tre estimata Patro prezidanto,

kun granda plezuro mi eksciis pri via afabla vizito de mia patrujo, kie vi partoprenis kunvenon de ĉeĥoslovakaj esperantistoj en Vsetín. Mi ĝojas ke mi estas povanta saluti vin kore kaj frate el la lando, kiun vi konas jam persone.

Ĉi tiun leteron vi ricevas de 38-jara inĝeniero, patro de du malgrandaj infanoj. Bedaŭrinde ne ĝojiga afero instigas min skribi al vi kaj peti vin pri urĝa kaj efika helpo. Akceptu sekvantajn vortojn kiel grava vokado ne nur de mi, sed mi kredas — de multaj, tre multaj gepatroj kaj aliaj homoj de bona volo.

Antaŭ nelonge venis en miajn manojn negranda kolora ilustrita gazeto «Color Climax» eldonata en Danlando. Sur la kovrilo desegnaĵo de virino kaj 4-lingva surskribo: «Nur por plenkreskuloj». Kaj interne pornografiaj fotografaĵoj — de unuopaj kaj amasaj scenoj de seks-eksplodoj kun ofendemaj detaloj. Terura abomenega rigardo!! Tiajn bildojn normala homo tute ne povas imagi.

Sed pli granda surprizo por mi estis konstato ke en tiu kajero oni mencias ne nur eldonanton kaj redaktoron — Jens-Peter Theander —, sed ankaŭ vicon da aliaj personoj — «arta» direktoro kaj asistanto, fotografisto kaj multaj aliaj — eĉ adreson de «Color Climax». Ne mankas «Copyright», «Printed in Denmark, CCC-Print». Tio signifas ke ĉi tiu agado estas en Danlando tute legala kun oficiala konsento. Do, tiel aspektas libereco en okcidenta Eŭropo!? Ĉu tie junaj homoj pro bonfarto ne scias, kion fari plu? Terura pripenso: sur unu flanko de la mondo tio ĉi, kaj sur la alia tragedioj de Vjetnamio, Orient-Pakistano, Biafro k. aliaj.

Ankoraŭ pli skua estas ekscio ke en norda Eŭropo oni vendas libere tiun nemoralegan literaturon en standoj. Kompreneble indiko: «Nur por plenkreskuloj» estas alloga precipe por junularo!! Laŭdire tie en landoj kun «vera libereco» trarigardas eĉ infanoj tiajn figazetojn surstrate. Kaj tiu konstato signifas por mi la plej teruregajn imagojn — ankaŭ miaj senkulpaj filetoj povus ekvidi iun tagon similajn bildojn, kiuj detruus **dum kelkaj sekundoj** ĉion bonan kaj pozitivan en iliaj animoj. Por pli aĝaj viroj la afero estas ege forta, do por la etuloj ĝi signifas totalan katastrofon, renverson de opinio pri homa vivo kaj digneco, por pli sentemaj neimageblan internan haoson.

Pornografiega bildaro disvastiĝas kiel la plej freneza pesto rapide tra la tuta mondo. Antaŭ kelkaj jaroj mi legis ankoraŭ pri amasaj orgioj en Francio kaj pri

kaŝa filmado de ili. Polico tiam malkovris la neston... Kaj nun? Kia « progreso »! Sed kie estas defendo, kontraŭatako? Kion faras kristanaj aŭtoritatoj kontraŭ tiu diabla lavango? Ĉu sufiĉas konstati la staton, paroli pri ĝi kaj admonadi? — tio similas nur al tiklado.

Mi alparolas vin kiel prezidanto de IKUE, kiel homo kun eblecoj kaj responsedeco. Alarmu afable ĉiujn ekleziajn altrangulojn kaj kulturajn instituciojn! Ĉiu perdita minuto signifas novajn pereojn, novajn detruojn de animoj, inkluzive de infanoj. Mi petas vin en la nomo de miaj infanoj kaj en la nomo de juna generacio — faru ĉion, kio estas en viaj fortoj kontraŭ tiu terurega malsano de homeco. Hodiaŭ estas jam malfrue, morgaŭ estus troveblaj nur ruinoj de homa socio.

Estimata Patro prezidanto, mi ne troigas kaj ankaŭ mi ne estas amiko de fortaj vortoj. **Bonvolu havigi tiujn venen-gazetojn** kaj poste vi certe agos! Sed mi petas, agu rapide, efike, persisteme kaj potence! Alimaniere estus ne eble fronti kontraŭ tiu danĝerego.

Dia helpo akompanu vin kaj viajn penojn!

Frate salutas

Adreso: Jan Kalny, Prazská 77, Znojmo, Ĉeĥoslovakio

**S-ro Kondor, hungara samideano en Lampertheim (Germanujo):**

Kun granda surprizo kaj samtempe kun ĝojo mi legis en la plej freŝa n-ro de EK, ke la nova redaktoro vi fariĝis. Akceptu okaze de tiu ĉi evento mian tutkoran gratulon kaj varmajn bondezirojn! Dio donu al vi la forton kaj lertecon tiel redakti nian karan gazeton EK, ke ĉiuj legantoj estu kun ĝi grandparte kontentaj. En la alparolo mi skribis interalie: kolego. Jen anakŭ mi estas, pli ĝuste dirite, estis gimnazia instruisto por lingvoj: hungara, latina, greka kaj rusa... Letero de U. Hoffmann, mia bonega, persona amiko, ege plaĉas al mi. La Vinoba-artikolo, via saluto precipe kaptis mian atenton...

**Sac. Feliks Stricki (Belgrado):**

Mi deziras esprimi por vi persone, por via funkcio en IKUE kaj por via gvida kunlaboro ĉe Espero Katolika plenan Dian benon.

Mi esperas, ke kun kaj per helpo de Dio vi kontribuos ke Esperanto fariĝu mondlingvo por la paco de la mondo.

La redaktoro dankas tutkore pro la bondeziroj kaj konsiloj, kiuj donas al li kuraĝon por plenumi lian taskon fervore kaj fidele. Al s-ro Kalny la Prezidanto respondis, esprimante sian doloron, kiun li suferas kune kun la gravaj zorgoj de kristana patro de familio. Li memorigis la kortuŝantan alvokon de la Papo kontraŭ la pornografio (vidu EK) kaj la tro facilajn kondicojn de la okcidentaj popoloj. La okcident-eŭropaj popoloj ne devas batali pro sia kredo; do ili malvarmiĝas kaj finfine perfidas sian kristanisman. Nia Prezidanto promesis disvastigi la leteron de nia samdeano Kalny.

---

---

Juna pastro memoris, dum li veturis per sia aŭto, ke li ankoraŭ devas finiĝi sian brevieran preĝon. Estis jam meznokto. Li eliris el la aŭto kaj antaŭ ĝi, je la lumo de la veturilo, preĝis.

Alia aŭto haltis apud li kaj la aŭtisto demandis: « ĉi tio bonordas? » La pastro: « ĉio ». La aŭtisto skuis la kapon kaj diris: « Mi ne komprenas, kian stranĝan libron li legas: ĝi devas esti tre interesanta, se li legas ĝin meznokte ».

## VI NE TIMU!

---

Dum la pastriga ceremonio la 29-an de Junio 1971 en la katedralo de Graz (Aŭstrujo) la diocezepiskopo Johano Weber, antaŭ sia episkopiĝo en 1969 paroĥestro de senprivilegia paroĥo de Graz, faris tre atendindan predikon sub la devizo: Vi ne timu!

« Decas, paroli nun gvidvorton. Por ĝi proponiĝas la plej ofta admono de la Skribo: « Vi ne timu! »

Se mi provizas per ĉi tiu admono al la ordinotaj sacerdotoj, mi pensas trioblon: **Vi estos ordinitaj en socion plenan de angoro.**

La homaro ekspertis, ke ĝi havas nur **sin mem**. Jen la prezo de tio, ke ĝi kredas, **Dion ne bezoni**. Tial ĝi volas kaj devas forigi ĉion, kio malhelpas plezuron — ĝi estu objekto aŭ homoj.

La pastro estas signo, ke ekzistas plio ol estas la homo; li estas signo de l'esĥatologio. Ni devas riski vivi malprudenton. Tial ĉi tiuj pastroj estas ordinotaj kun plena konscio de la signifo de jena farado: Por sia tuta vivo ili maldeziru propran familion. Ni devas eĉ riski, vivi malprudenton, por al la homoj diri la savon: **Ekzistas plio!**

**Vi estos ordinitaj en eklezion plenan de angoro.**

El ĉiuj postenoj laŭtiĝas voko de angoro. Oni parolas pri **krizo de la eklezio**. Fakte estas tiel, ke la eklezio partoprenas precipe tuŝeble grandan krizon de la homaro. Ĉi tiu angoro preteriras la verajn faktojn:

forĝeso nin minacas pri tio:

ke estas kristane, esti **provata**,

ke estas kristane, **pilgrimadi**,

ke estas kristane, **perdi sian vivon** (ankaŭ tiun de l'eklezio), por ĝin trovi.

Fine ni troviĝas en la angoro, forĝesi, ke ne ni, sed Kristo konstruas kaj konservas la eklezion. « Mi estos kun vi ĝis la fino de la mondo ». Mi ne povas al vi promesi, ke ĉiam vi estos estimataj, ke vi ĝuos socian respekton.

Mi ankaŭ ne povas promesi al vi, ke vi finos vian vivon sen persekutiĝoj. Oni opinios vin senutilaj, nomos vin malamuzaj. Oni klopodos, vin sensignifi kiel muzekustodojn de religia ritaro. Kaj tiam estos nur jam paŝeto al ekstera persekutado, al teroro.

Pli bone mi postulos de vi, ke konsentu kaj **amu** la eklezion tia, kia ĝi estas.

Vi ne ploru pri vianduroj de loĝadigita kaj senproblema eklezio. Sed vi ankaŭ ne preĝu al la Ora Bovido de **minimumemaj** patentsolvoj.

Poste mi povas al vi promesi, ke oni povos paroli pri vi: Ili estis viroj **helpintaj** al la vera renovigo de la vizaĝo de l'eklezio laŭ la spirito de Dio.

**Fine vi estos ordinitaj kun la scio, ke la timo atakos ankaŭ vin.** Konsciu ĉi tion sobre jam hodiaŭ. Daŭre la homo ne povas vivi kun timo, sed li vivas kun **certeco** kaj **espero**:

Tial vi estu viroj de **preĝado**. Ne trompu vin! Ĉi tiu preĝado bezonas ordon, disciplinon, kuraĝon por senbruo.

Poste vivos via vorto kaj vivado fariĝos vorto. Vi rajtos diri: Kun Li mi venkis la mondon, sed ne tial, por ĝin **malakcepti**, sed por ĝin **renovigi** kun Li. Kaj tiel vi renovigos ankaŭ vin mem.

**Ankoraŭ vorton al la gepatroj.**

En kredulara komunajo iam estis la pleja honoro, havi pastran filon. Hodiaŭtempe ĉi tio ne plu estas. Sed al vi estu dirite:


**Li vokis vian filon. Ĉi tio sufiĉas! Do, ne timu!**

(Peris D-ro A. Halbedl.)



## POR OKULKLINIKO

---



Vidu artikolon je la p. 118

Malnov-testamenta leĝo, la t. n. lex talionis,

diras: « Okulon pro okulo, denton pro dento ». Nu, rilate al la dentaro de la Afrika loĝantaro mi ne havas zorgojn, sed kion diri pri la nenecese blindaj okuloj? Kiu estas preta interŝanĝe doni por siaj sanaj okuloj la lumon al la blindaj okuloj de Afrika frato aŭ fratino?

En la nuna momento P. W. F. bezonas kirurgian instrumentaron por du okulistoj en Bavku (Ganao) kaj Mukumi (Kenjo). La kostoj sumas ĉ. 20.000 nederl. guldenojn. Al la legantoj de « Heroldo de Esperanto » mi petis helpi min rilate al la okulisto en Bavku.

Ĉu estas inter la membröj de I.K.U.E.

iuj, kiuj pretas finance kontribui al la alia urĝa projekto?

Volonte mi akceptas mondonacojn, invitojn por paroli kun grandaj grupoj, ĉu de esperantistoj, ĉu de aliaj bonaj homoj, sugestojn, proponojn, kritikojn, k. t. p. Mi ŝatas prediki (kun posta monokolekto) dum diservoj. Bonvolu propagandi la aferon en la loka gazetaro, inter parencoj kaj amikoj, en la loko kie vi laboras, k. t. p.

Ĉiu kiu deziras helpi, bonvole kontaktu la iniciatinton: S-ron Jacques Tuinder, Jan Ligtharstraat 39, Heemskerk, Nederlando. Poŝtĉekkonto n-ro 10 20 100. Menciuj sur la slipo: « okulon pro okulo ». Bonvenaj estas ankaŭ poŝtmarkoj, gramofondiskoj, pupoj folklöre vestitaj kaj kio ajn vendebla.

**J. Tuinder**

## TIO OKAZIS AL FAMAJ HOMOJ.

---

La fama filozo Immanuel Kant post longa pripensado decidis edziĝi. Sed kiam li anoncis sin en la domo de la elektita virino, li eksciis kun granda seniluzio, ke ŝi estis ŝanĝinta domon kaj urbon antaŭ dudek jaroj.

\* \* \*

Kiam la belga reĝo Baudouin estis en USONO, li vizitis ankaŭ Detroit. Ĵurnalisto de « Detroit Times » deziris scii la precizan tempon de lia forveturo kaj telefonis en la hotelon Sheraton-Cadillac, demandante ĉu la predelegito estas en la hotelo. Milda voĉo respondis: « Mi bedaŭras, li eliris antaŭ malmultaj minutoj ». La ĵurnali-

sto diris: « Domage! Pardonu min, korean dankon! ». Post unu horo la sama ĵurnalisto telefonis kaj la sama milda voĉo respondis: « Mi bedaŭras, li ankoraŭ ne venis; sed se mi povus esti utila... » La ĵurnalisto: « Ĉu Vi hazarde scias, kiam la reĝo de Belgujo forveturos? ». La milda voĉo respondis: « Tie ĉi parolas la reĝo Baudouin, mi forveturos hodiaŭ je la 14-a horo ».

\* \* \*

La fama muzikisto Pablo Casals estis demandata, kial li ĉiutage ekzercas sin kvar-kvin horojn. Li respondis: « Mi havas la impreson, ke mi progresas bone ». Kaj tiam li estis 87-jara.

---

---

## NI FUNEBRAS

LA 21-an DE LA PASINTA SEPTEMBRO,

post longa malsano forpasis, je la aĝo de 88 jaroj en sia Florenco prof. Corrado Grazzini, honora ĝenerala direktoro de la Itala Instituto de Esperanto kaj fondinto de UECI. La meso, kiun ni aŭskultis la 10-an de oktobro okaze de nia kutima dimanĉa kunveno, estis oferita por lia animripozo. Ĉeestis, kron la esperantistoj, ankaŭ la fratino de la forpasinto, s-ino Maria Amelia Severi Grazzini; kaj en la posta renkontiĝo s-ano Luigi Minnaja inde memorigis lian noblan figuron. La oratoro reliefigis la multajn kaj grandajn meritojn de Prof. Grazzini en la esperantista kampo, en kiu li fervore dediĉis sian tutan liberan tempon. Sufiĉas prime-mori la unuan Italan Esperanto-Kongreson, kiu, de li organizita en 1910, ĵetis la fundamentojn por la estonta agado. Fakte en tiu kongreso fondiĝis la 21-an de marto la Itala Esperanto-Federacio. En la sama jaro, okaze de la 12-a Itala Kongreso de la instruistoj en Florenco estis proponita la starigo de la « Associazione Italiana 'por Esperanto' fra gli italiani insegnanti », kun pozitiva rezulto, ĉar ĝi estis efektive fondita en Florenco la 16-an de novembro 1913. Bedaŭrinde tiu organizaĵo, kiel cetero multaj aliaj, malaperis, sekve de la milito 1915-18. Sed alia grava, peza kaj respondecata ofico atendis prof.on Grazzini: la « Katedro de Esperanto », kiu en la 1932-a ŝanĝis la nomon en « Itala Instituto de Esperanto ». Li

komencis ĝian funkciigon en 1922 kiel Sekretario, kaj de 1925 ĝis 1962 li estis ĝia Ĝenerala Direktoro. Intertempe pere de kursoj, libroj kaj multaj artikoloj li senlace laboris por disvastigo de Esperanto. Vere admirinda tiu persista agado, se oni pripensas, ke la du mondaj militoj ĉion detruis, kaj ĉiufoje necesis rekomenci la agadon preskaŭ el la fundamentoj. Sed tio, kio aparte rilatas nian katolikan movadon, estis ke, la 4-an de oktobro 1920, dum la 5a Itala Esperanto-Kongreso, en kies kadro estis organizita la 1-a Kongreso de la Italaj Katolikaj Esperantistoj, kun la beno de papo Benedikto XV, ĝuste prof. Grazzini lanĉis la unuan ideon por la starigo de UECI (Unione Esperantista Cattolici Italiani). Ni lasas ĉi tie la vorton al s-ano Minnaja:

« La propono — li diris — estis tuj akceptita kun simpatio, ĝi vigligis interesan diskuton, kiu kulminis en tagordo aprobita unuanime, per kiu estis fondita la « Unione Esperantisti Cattolici Italiani » kaj estis elektita direkta komitato konsistanta el s-oj Grazzini el Florenco, prezidanto, Pizzi el Venecio kaj Saggiori el Padova. La postan jaron 1921-an dum la 2-a Kongreso de la Italaj Katolikaj Esperantistoj, disvolviĝinta en Trento la 16-an kaj 17-an de aŭgusto, kune kun la 6-a Itala Esperanto-Kongreso, la statuto de UECI, laŭ la tagordo de Grazzini, ricevis la definitivon aprobon kun pli ampleksa direkta Komitato, kaj prof. Grazzini fariĝis Ĝenerala Sekretario. Tiam oficon li plenumis kun sia kutima zorgemo ĝis la 3-an Kongreso, kiu havis lokon en Venecio la 17-an kaj la 18-an de septembro 1922, dum kiu estis elektitaj kiel prezidanto P. Carolfi kaj kiel sekretario s-ano Pizzi ».

Ankaŭ por la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Italujo en la jaro 1935-a, kongreso, kiu disvolviĝis tra diversaj italaj urboj, pro la alveno de la kongresanaro en Florenco, prof. Grazzini devis streĉe labori. Tiu, kiu ne havas personan sperton pri tiaj aranĝoj, malfacile povas imagi, kion da klopodoj ili postulas. Kaj denove li surprenis sur siajn ŝultrojn la taskon de tiu organizado, kiam oni decidis, ke la 30-a Itala E-Kongreso en 1959 okazos en Florenco. Tiu, kiu vidis unu el la plej alta nombro da partoprenantoj en la italaj Esperanto-Kongresoj, montris ankoraŭfoje, kiel valora homo estis prof. Grazzini, al kiu la Itala Esperanto-Movado multe ŝuldas, kaj aparte nia UECI, kiu memoros lin kun neesprimebla admiro kaj dankemo.

*El K. S.*

\* \* \*

### VETERANO MORTIS!

Funebros la Florenca kolegaro,  
l'adeptoj tristas de la « Nova Sento »;  
de l' nordaj Alpoj ĝis la suda maro  
penseme restas l' Esperanto-gento.



Forpasis tra la varmo de l' fervoro  
soldato nobla de la pac-batalo,  
al frata amo sonoril-sonoro,  
ardanta flam' por alta idealo.

La strebo ĉesis kun la kor' pasia,  
sur la papero haltis laca mano;  
la Esperanto-Institut' Nacia  
priploras la forperdon de l' Dekano.

Fermiĝis buŝo, kiu plaĉe vortis:  
Grazzini, l'olda veterano, mortis!

Roma, 26/9/1971

Luigi Minnaja

\* \* \*

RICEVINTE LA ĈAGRENAN informon pri forpaso de s-animo Ruzena Kaplerovà, okazinta la 24-an de septembro en Praha, ni levas niajn preĝojn por ŝia animo kaj niajn kondolencojn al la filino Jindra.

---

---

## HUMORAĴOJ

La amerika radiodirektoro Manny Sacks estis konata pro sia boneco kaj pacienco. Iam li invitis aktorinon al tagmanĝo en luksa restoracio. Kiam li volis forveturi, la aktorino babilis senĉese. Manny diris: « Mi bedaŭras, sed mi devas flugi tuj per aereoplano al Chigago ». Laŭvere li diris tion por iri tui hejmen, ĉar li havis multe da laboro. La aktorino diris: « Mi venos kun vi por helpi vin paki en via domo. Vane li diris, ke tio ne necesas. Kiam ili pakis ĉion, la aktorino diris: « Nun mi akompanas vin al flughaveno por helpi vin ». Li devis kontentigi ŝin. La aktorino atendis, ĝis la aeroplano forveturis, salutis lin agitante sian manon. La radiodirektoro faris sopirante sian flugon, poste revenis tuj per alia aeroplano al New York.

---

### ESPERO KATOLIKA

Oficiala organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)

---

**Rajtigo de la tribunalo de Milano n. 208 (27 majo 1971)**

---

**Respondeca direktoro: Longoni Ferdinando**

**Via s. Ambrogio 2 - Tel. 9960050 - I - 20051 Limbiate (MI)**

---

**Presejo: Soc. Tipo-litografica G. e M. Bigliardi - Via Tana 18 - I - 10023 Chieri (TO)**

---

**Ekspedo per poŝtabono - Gr. III/70 - Supplemento al n. 12 de « Lungo la via »**